Esperanto France (UFE) deponita de Aleks KADAR, reprezentota de Christian LAVARENNE

Espéranto France kandidatiĝas al Komitato de la Kulturdomo Grésillon, por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

La asocion reprezentas s-ro Christian Lavarenne. Nia asocio montras per tiu kandidatiĝo sian intereson pri la ekzisto kaj sorto de la Kulturdomo, agnoskante ĝian konsiderindan rolon en la francia Esperanto-movado.

Esperanto France subtenas la projekton por malfermo de la Kulturdomo, konsiderante, ke necesas pligrandiĝo de la uzantaro de la Kulturdomo - la esperantista publiko ne sufiĉas - kaj disvolviĝo de ĝia gastiga agado.

Voĉdonante por tiu kandidato, vi samtempe voĉdonos por oficiala, malkaŝa partopreno de la asocio Esperanto France, landa asocio de UEA en Francio, en la vivo kaj prizorgado de la Kulturdomo.

NB: Se la jura situacio necesigas, tiu ĉi kandidatiĝo egalas kandidatiĝon de la asocio Espéranto France reprezentata per sia prezidanto, alikaze kandidatiĝon de s-ro Christian Lavarenne reprezentanta la asocion Espéranto France.

SAT-Amikaro deponita de Vito MARKOVO, reprezentota de Guy MARTIN kaj Phil FRESLON kiel anstataŭanto

Sub rezervo de ratifo far la membroj per la jara referendumo en decembro 2010 de la kongresa decido, la asocio SAT-Amikaro kandidatiĝas, kiel societano, al la Komitato de la Esperanto-KulturDomo Greziljono. Estis mandatita skipo por partopreni la komitatkunvenojn kaj tie esprimi la vidpunkton de la asocio.

Ni subtenas la principon projekti malfermon de la Greziljonejo kaj evoluigi la statutojn lige kun la kolektivoj kaj asocioj de Baŭĝea regiono, prioritate serve al la disvolvo de Esperanto. Ni konsideras, ke la esperantistoj solaj ne plu sufiĉas por vivigi tian strukturon. Ni agos por certigi pli grandan travideblon por la societanoj de la EKD pri la agadoj proponitaj kaj evoluo de ĉi projekto.

La ĉeesto de gravaj esperanto-asocioj en la Komitato de la kooperativa societo de Greziljono estos plia atuto por klopodi reakiri ĝian famon kaj daŭrigi ĝian kulturan agadon.

Christian VACHERON

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastidado en la regiono de Baugé ».

Mi naskiĝis en 1941, emerito de loka kolektivumo, konstrumezuristo, esperantisto de 1958 sen esperantista aktiveco ĝis 2005, poste staĝoj en Grésillon. Kasisto de la asocio « Esperanto 94 ».

Nuntempe, la KDE ne povas kalkuli nur pri la dinamiko de volontula helpado, tamen tiu elemento estas ne forĵetinda, sed tute male, necese kreskiginda, kiu ajn solvo estos adoptita. La malfermo al lokaj institucioj en la kadro de « SCIC », ŝajnas al mi la ĝusta direkto manke de aliaj pli bonaj solvoj. Necesas substreki ke la juraj dispozicioj de tiu strukturo, protektas nin kontraŭ ĉia kapto de la potenco fare de institucioj aŭ homoj.

Pierre DIEUMEGARD

Naskiĝinta dum 1955, mi instruas biologion kaj geologion. Mi konas la lingvon Esperanto ekde 1983. Esperantie, mi partoprenis kongresojn de SAT kaj UEA, kaj mi verkis artikolojn de PIV pri biologio kaj geologio.

Profesie, mi organizis ekskursojn por gestudentoj. Volontule, mi organizis tendarojn por geskoltoj. Tiuj agoj pensigis min ke ni ŝanĝu la laŭjuran organizon nunan de Gresillon. Tiu "kultura centro" ne efikas kiam statuto malliberigas ĝin je hotela entrepreno kiu samtempe estas kooperativo nur por membroj. Necesas ŝanĝi al nova organizo kiu zorgos pri kastelaj kaj bienaj aferoj, kaj al aliaj organizoj kiuj zorgos pri staĝoj, ferioj, kursoj. Tiel la kastelo estos pli bone kaj pli longe uzata, profite al esperantistaro, al financo de Grésillon, kaj al la tuta regiono de Baugé.

Elisabeth BARBAY

Naskiĝis en 1953. Edukistino. Esperantiĝis en 1994. Ekkonis Grezijonon en 1997 okaze de infanstaĝo kien mi venigis 6 lernantojn. Plurfoje staĝumis somere kaj mem gvidis kurson en 2001. Nun, gvidas 4 esperanto-kursojn semajne (diversaj niveloj kaj aĝoj) kaj ricevas pagon por 1, en Interaĝa Universitato de Chelles.

Konkretaj proponoj por Grezijono : kiel en 2006, 2007 kaj 2008, teame organizi ĉiujare la infan-semajnon FRINGOJ, viv-ĉerpujo por la estonta esperantistaro, montro-fenestro por E° kaj por la Kulturdomo (regione kaj Esperantuje), dank'al la fina spektaklo malfermata al ekstera publiko**.** Per nekostaj rimedoj (mi pretas helpi praktike kaj mone), transformi la Zamenhof-salonon al taŭga plurcela ejo, kun lumoj, sonsistemo, scenejo, tiel ke artistoj kaj asocioj (ne nepre E-istaj) ekŝatos uzi ĝin. Luota kune-kun servo de teknika responsulo por spektakloj, prelegoj…, tia ĉambro alportus al la kastelo parton de la mono necesa al ĝia prizorgado.

Mi deziras harmonie kunlabori kun ĉiuj bonvolemuloj interesataj de miaj proponoj. Plej ŝatataj projektoj : tiuj de F. Lo Jacomo kaj la 4 bis.

Jannick HUET-SCHUMANN

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Mi naskiĝis en 1954, mi estas emerita instruistino (agregacia), mi praktikas Eon ĉiujn tagojn kun mia edzo Bert (germano) kaj miaj infanoj (16 kaj 14 jaraĝaj), granda parto de nia vivo estas ligita al Eo en Francio kaj eksterlande. Mi loĝas apud Rennes, kaj bezonas 1 horon kaj 45 minutojn por veturi ĝis Grésillon. Mi vizitis regule Grésillon ekde 2000 por laborsemajnfinoj. Bert kaj mi organizis en 2003 kaj 2008 Renkontiĝojn de Esperantistaj Familioj (REF) en Grésillon, partoprenis ĉ 80 personoj.

Mi estis elektita kiel komitatano de la KulturDomo en 2006. Ĉar mi konstatis ke la neceso, laŭ mia vidpunkto, de funda ŝanĝo por la administrado de nia bieno ne povis esti realigebla, mi rezignis kunlabori en septembro 2008.

Nun, vi, la societanoj por sekvi tiun vojon devas voĉdoni por la kandidatoj kiuj esprimis sin por ŝanĝo de sinteno por ke la KulturDomo havu novan vivon kiu pli bone solvas la ekonomiajn hodiaŭajn problemojn kaj ebligas la valorigon de Eo vidalvide al ĝenerala publiko.

Jean-Yves GRILLE

61-jara, emerita grafikisto pri reklamado

Mi esperantistiĝis en 2006. Partopreno en 2006, 2007, 2008 kaj 2009 en semajnstaĝoj ĉiusomere en Greziljono. Partopreno en staĝo pri Japanio en Aprilo 2009 kaj staĝo « verkado » en Majo 2009. Partopreno kiel volontulo en laborsemajnfinoj en 2008.

Mi loĝas je 30 km for de Baugé kaj proponas strebi kaj helpi laŭ miaj eblecoj kaj la bezonoj por pluvivigi Greziljonon kiel esperantistan kulturcentron, aparte per disvolvo de la komunikado por ke la staĝanoj venu pli multnombre. Ĉiuj ideoj kunhelpantaj por atingi tiun celon devas esti studataj sincere, objektive kaj amiketose. La projekto « Greziljono Sendependa dank'al volonteco » estas miaopinie taŭga respondo al la problemoj.

Claude TRÉSORIER

Naskiĝinta en 1948, de gepatroj esperantistaj kaj kunfondintoj de la KulturDomo. Mi vivas en Göttingen, Bas-Saksujo, Germanujo. Dumviva membro de Espéranto-France, membro de la Societo Zamenhof de UEA, membro de SAT, SAT-Amikaro, ktp. Mi kandidatiĝis en 2008 por la Administra Komitato, ĉar mis taksis ke la KulturDomo ne sufiĉe informis siajn societanojn. Elektita, mi konstatis gravan krizon kaj deziris helpi kaj ŝanĝi.

La societanoj, kiu legas revuojn de la esperantista mondo, povis vidi gravajn atakojn kontraŭ la KulturDomo. Ni bezonas respondi ne nur per artikoloj, sed per agoj:

- Plibonigi la loĝejon.
- Malfermi al eventoj ekster la «esperantismo» ktp.
- Tamen ne forgesi la kulturajn kaj socialajn misiojn proprajn de Esperanto.
- Partoprenigi la komunumojn en la internaciaj agadoj («Fringoj»).

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Michel DENIS

57-jara, administranto de societo, rezidas en la departemento Maine-et-Loire.

Societano de la Kulturdomo ekde 2001. Mi partoprenis en laborsemajnfinoj kiel volontulo.

Mi proponas servi per miaj kompetentoj :

- kohereco de la projekto
- efika interna komunikado
- sana administrado de la posedaĵo de la Kulturdomo por certigi la longdaŭrecon de tiu amika loko dediĉita al la instruado de Esperanto, por la renkontiĝo kaj la paco inter la popoloj.

Mi kontribuis al la ellaborado de la projekto "Grésillon sendependa dank' al volonteco" por partepreni la pripensadon pri la estonteco de la Kulturdomo kaj la interŝanĝo de ideoj inter la societanoj.

Xavier GODIVIER

Mi kandidatiĝas por subteni la projekton « Por la malfermo... ».

40-jaraĝa, aktiva esperantisto de 1998, mi estas prezidanto de la federacio Esperanto-Bretonio. Mi loĝas inter Rennes kaj St-Malo, 2h30 veturile ĝis Grésillon, kien mi venas ofte de 7 jaroj, interalie kiel respondeculo de Esperanto-semajnoj somere.

Mi estis elektita komitatano en 2004 kaj reelektita en 2008. La malfacilaĵoj de la lastaj jaroj instigis min proponi, dum la membrokunveno 2009, la tutan renovigon de la komitato, por starigi teamon de homoj kiuj interkonsentas por labori kune. Dankon do voĉdoni por nia tuta teamo. Nia projekto celas malfermi pli larĝe la utiligadon de la kastelo, invitante ĉiujn esperantistojn kaj ĉiujn esperantistajn asociojn, kaj ankaŭ malfermante al aliaj asocioj kaj organizado de kunvenoj kaj gastigado, por financi la prizorgadon kaj daŭrigadon de la kastelo.

François LO JACOMO

55-jara informadikisto, Esperantisto de post 1971. Mi studis lingvistikon kaj matematikon, aktivis en asocioj (IAdEM, TESPA, JEFO, UEA, EDE… SILF, Animath…) jam de 1974 kaj administras societon (SCI). Ekkoninte Greziljonon en 1972, mi societaniĝis en 1977 sed ankoraŭ neniam komitataniĝis.

Kiel mi precizigas en mia « projekto pri reorganizo », plej urĝas rekrei fidindan etoson, kiu allogu staĝanojn kaj instigu bonvolemulojn investi sin. Unuavice, respondecigi ĉiun komitatanon per pli bona dispartigo de la taskoj, fiksi kvantigitajn kaj malutopiajn celojn, plibonigi internan kaj aleksteran komunikadon. La projektoj de JM. Houviez, pli turmentaj ol entuziasmigaj, ne ebligas altiri energiajn agemulojn cele al vera renovigo. Mi ja apogas, ke oni pli sisteme malfermu la kastelon, eĉ al ne-Esperantistoj, kaj rapidigu la renovigadon de la konstruaĵo. Ne plu estas tempo farigi ĉion de volontuloj, sed ni konsciu pri la praktikaj aspektoj de tia transiro al nova administrado : peza strukturo “SCIC” kun salajratoj ne nepre estas plej adekvata, kaj helpo de lokaj ne-Esperantistaj instancoj ne sufiĉos por solvi ĉiujn problemojn.

Jeanik MAROLLEAU

Instruas elektronikon kaj la anglan en la universitato de Angers. Obtenis Kapablecon en 2002. Instruas Esperanton de 2000. Partoprenas en diversaj internaciaj kongresoj. Post komitataniĝo en 1999, volontule, aktive kaj skipe laboris por Grésillon de 2000 ĝis 2008 per :

- organizado kaj administrado de staĝoj, partopreno estiel paganta staĝano
- provlegado de Kulturaj Kajeroj
- organizado kaj mastrumado de la volontulaj laboraj semajnfinoj
- administrado de diversaj teknikaj aspektoj: prizorgado kaj plibonigoj plumbistaj, hejtistaj, elektristaj, tegmentaj, sekurecaj...
- laŭnormigo kaj obteno de uzpermeso de la kuirejo, de 5 ĉambroj (2a etaĝo) kaj de apartamento
- kreado de la komputikejo
- rilatoj kun la entreprenistoj : prezproponoj, laborprizorgado...
- dialogo kun la Sekurkomisiono
- protokolado pri la teknikaj laboroj

Mi pretas reuzi ĉi kompetentecojn por Grésillon se klara majoritato favoras nian projekton Grésillon sendependa dank’al volonteco.

Bruno FLOCHON

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Mi estas 38-jaraĝa, respondeculo pri informado, aktiva esperantisto de 1994, mi estas kandidato por subteni projekton por savi tiun gravan eron de la historio de Esperanto. Tial mi subtenas la projekton malfermi la strukturon kaj la ejon ĉar ĝi ŝajnas al mi la plej realisma kaj la nura ebleco por la pluvivo de la kastelo kiel vivloko je la servo de esperantistoj. Kombinaĵo de bonvolemo kaj de profesiigo estas la nura solvo al la nunaj malfacilaĵoj, kaj la adaptigo de la jura kaj financa strukturoj estas ne-malhavebla etapo.

Mia sperto pri la fondo de KoToPo en Lyon, en kiu mi longe partoprenis antaŭ pli ol 10 jaroj, konsciigas min pri la malfacilaĵoj de la tasko alfrontenda sed ankaŭ pri la bonaj ŝancoj de sukceso, laŭproporcie.

Mi plie celas ĉiam preferi la dialogon ol la alfronton por ke la diskutoj en la komitato kaj la komisionoj estu konstruivaj kaj produktivaj.

Jorgos (Georges) COMTE

Naskiĝinta 20-an de januaro 1955 en Fleurieu-sur-Saône - Rodano, 69-a departemento de Francujo.

Mi prezentiĝas por la Komitato de Grezijono por realigi la projekton nomatan « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Mi estas dungita, kiel hejm-edukisto en instituto por malhelpataj infanoj kaj ĉiutage uzas Esperanton kun miaj infanoj (Ĵasmin', baldaŭ 14-jara - dumviva membrino de U.F.E. -, Floreal', baldaŭ 11-jara, kaj Luma, 7-jara), la plej granda parto de mia vivo estas ligita al Esperanto tiom en Arjeĝo, en Aldeo, kiom en Francujo aŭ eksterlande. Mi loĝas inter Karcasuno, Tuluzo kaj Andoro kaj miaj ge-bopatroj loĝas en Saint-Brieuc... Grezijono do estas "survoje".

Mi sufiĉe bone konas plurajn subtenantojn de la projekto « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé », jam de multaj jaroj kaj pretas kun ili partopreni tiun engaĝiĝon se la societanoj min elektas, kiel kandidaton.

Lucette ÉCHAPPÉ

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Naskiĝinta en 1950, konsilistino pri dungado, loĝanta apud Nantes, mi pensiiĝos en julio 2010.

Mi komencis lerni E-on en 2004; mi ekkonis Grésillon samsomere, ni partoprenis laborsemajnfinojn. Mi implikiĝis fine de la membrokunveno 2009 en la demarŝon de François Lo Jacomo por la jura reguligo kaj la novigo de la komitato.

Mi ofte aŭskultas 'BFM, la radio de la ekonomio' ; do la projekto por la malfermo ŝajnas al mi saĝa, i.a. ĉar la analizo de ĝiaj subskribintoj korespondas al la neevitebla ekonomia realeco.

Mi nun klerigas pri la normoj de higieno en publikaj lokoj (HACCP) por konformiĝi al kontroloj de san-servoj en la Kulturdomo. Mi engaĝiĝos en la mastrumajn taskojn kaj volonte laboros kun ĉiu kiu deziras partopreni.

Mi estis komerca vendisto antaŭ 1999 kaj inklinas pri la temo 'reklamo', mi ŝatus implikiĝi en tiu fako kaj ankaŭ pri la kontaktoj kun publikaj instancoj, en kiuj mi ja laboris.

Gérard FILLION

Mi estas 57-jara, mondcivitano, profesie teknikisto pri termika inĝenierado, unu el la fondintoj de EDE-IdF (kandidato dum la eŭropaj balotelektoj 2004 kaj 2009), iĝis societano de la Kulturdomo en 2005, kaj kunorganizis en Grezijono la infanrenkontiĝojn FRINGOJ de 2006 ĝis 2008. Loĝante 300 km for de la Kulturdomo, mi ne povas fizike labori surloke sed arde deziras partopreni ties kulturan vivon. Tiucele mi proponas :

1. Denove organizi infanrenkontiĝojn en Grezijono ;
2. Starigi datumbankon enhavantan ĉiujn historiajn, turismajn, teknikajn, sciencajn informojn rilatajn kun la bieno kaj ties ĉirkaŭaĵoj, redaktitajn sub alloga formo, cele al praktika uzado kiel baza materialo por la staĝoj aŭ por faciligi la priflegadon de la kastelo ;
3. Diĝitigi la multnombrajn dokumentojn nuntempe kuŝantajn ĉe la 2a etaĝo, komencante per la plej malnovaj, la plej malbone konservitaj aŭ ekzistantaj en ununura ekzemplero por ebligi ties konsultadon sen risko ilin difekti, kaj faciligi ties klasifikadon ;
4. Kiel eble plej profesiece realigi filmon, kies temo estos la Kulturdomo, celante pli bone ĝin konigi al la esperantistaro kaj utili kiel malkovrigilo kaj allogilo por la aliaj.

Dominique BARON

Mi estas 48-jara. Mi profesias kiel disciplinestro en kolegio. Mi loĝas en Tours, proksime de Grésillon.

Mi estas prezidanto de Centre Culturel Esperanto-Touraine. Mi frekventas Grésillon de 25 jaroj, jen helpante, jen instruante, jen staĝante aŭ kiel staĝestro.

Plie mi prizorgas la bibliotekon, libro-servon kaj arkivojn. Mi daŭrigos la ordigon de la arkivoj kaj metos ilin je la dispono de la publiko por historiaj esploroj. Mi metos la bibliotekon en bibliotekan programon en komputilo por faciligi la pruntadon.

Estos bone, ke Grésillon havu kontaktojn kun aliaj bibliotekoj (Herzberg, Gray, Vieno en Aŭstrio, Bouresse...).

Denis-Serge CLOPEAU

Mi kandidatiĝas por apliki la projekton « Por la malfermo kaj la politika ĝisfunda ŝanĝiĝo por la kreado de aktivaĵoj-centro kun gastigado en la regiono de Baugé ».

Mi lernis Esperanton 14-jara en 1967, Grezijono estis mia unua lingva bano. De tiam mi vicigis kursojn kaj respondecojn je loka, nacia, internacia niveloj. Mi regule varbis por Greziljono. La nuna socio malgrandigis nian laborfortojn, pro mallongigo je unu monato de la ferioj de la instruistoj kaj studentoj kaj prokrastante la emeritiĝ-aĝon je pluraj jaroj. Por estonteco nepros profesiiĝo. Tiu konvinko sekvigas mian aliĝon al projekto, kiu statute celas: implikon de pagipovaj institucioj, malfermon de la programoj, vivneprajn konstruaĵ-investojn. Plu proponi dek semajnojn da Esperanto-programo, jen tio, kio fakte donos kulturdomon al la esperantistoj por la venontaj generacioj.

Jean Marie HOUVIEZ

Jean Marie Houviez, naskiĝinta en Arras en 1946, radio-elektrikisto, teknikisto pri reto kaj sistemo de telegardado, scio pri administrado. Mi renkontis Maryvonne kaj Esperanton en 1978. Ekde kelkaj jaroj, mi asistas Maryvonne pri loka promocio de Esperanto.

En 2008 mi iĝas societano de la Kulturdomo kaj malkovras bilancojn kiuj anoncas financajn malfacilaĵojn. La Administra Komitato petas min iĝi teknika konsilisto pri informadiko kaj eniri la financan komision.

La nova Administra Komitato devos respekti la leĝojn, niajn statutojn, la decidojn de la Membrokunvenoj kaj sanan administradon. Eksterordinara Membrokunveno estos kunvokita por validigi la araĝojn de protekto de la kooperativo (kodekso de societoj), doni fidon al la donacantoj kaj investantoj povantaj doni 500 000 € dum 5 jaroj aŭ kaze de fiasko negoci vendon de Greziljono por ebligi financadon de Kulturdomo adaptita al nia buĝeto kaj eviti justican vendon.

FINO DE LA SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ